

ESPRIMOJ DE LA NE-LAUSANGAJ PARENCECOJ

SZEMÖK, Balázs (HU)

La plej grava ne-lausanga parenca rilato estas la boparenceco. Pli frua artikolo tekstis "Esprimo de la malproksima parenceco per la prefiksoj pra-kaj bo-" (SR Vol. 45 (1994)(2)-165, p. 31-34). Mi priparolis, el kiuj parencoj konsistas la granda familio, do tiuj, kiuj devenas el komuna praulo. nun mi volas skizi tiujn rilatojn, kiuj ligas la diversajn grandajn familiojn kaj kiuj estas nek lausangaj nek boaj parencoj.

1. Antaŭgeedzaj kaj nuptofestaj nomoj.

La gejunuloj komence estas gekonatoj, geamikoj. Pli poste la fraŭlo fariĝas amindumanto (aktiva aspekto), la fraŭlino estas amindumatino (pasiva aspekto). Nuntempe ankaŭ la fraŭlinoj rajtas iniciati, do troviĝas trafe la esprimo geamindumantoj; ili estas la enamiĝinta paro. En la lasta antaŭgeedziĝa stato ili fariĝas gefianĉoj. Poste sekvas la granda festo, la nupto, por kiu oni bezonas porokazajn postenulojn, kiuj estas elektitaj elinter parencoj, amikoj, najbaroj. Krom la juna paro la plej gravaj personoj estas la atestantoj. Ili ĝenerale estas la baptopatroj, en aliaj regionoj la pli aĝaj onkloj, eble najbaroj. Ili gvidas la parencon al la preĝejo kaj al la matrikulejo (civilstatoficejo), subskribas la dokumenton kaj revenante ili cedas sian lokon al la juna paro signante, ke la junaj edzo kaj edzino fariĝas plenrajtaj familianoj. Tiu posteno estis en la pasinteco vira privilegio.

La atestantoedzinoj ankaŭ havas gravan taskon: la direktadon de la festenaj preparoj en la kuirejo. Se la atestanto ne estas edziĝinta, oni serĉas fraŭlinon, kiu havas rutinon de la kuirejaj aferoj.

Funkcias ankaŭ atestistoj; ili sidas en la atendejo de la matrikulejo. Se venas paro, kiu geedziĝas senceremonio, la "atestistoj" subskribas la dokumenton pro mono.

Internacia Scienca Asocio Esperantista

Oni elektas kaj invitas du ceremonioestrojn. Ili estas pli junaj amikoj au najbaroj, malofte parencoj de la juna paro. Esti pli juna ol la nova paro estas rigora regulo. En iaj regionoj ĉi tiun taskon plenumas spertaj pliaĝaj "profesiuloj" kiel ceremoniomastroj. El televido estas konata iu aĝa sinjoro, kiu celebris pli ol mil nuptofestojn, do li meritas la titolon majstro.

En la nupta procesio post la juna paro iras du geknaboj, kiuj portas la vualon de la fianĉino kaj ŝutas florojn; ili estas la etflorkrona paro. Ilin sekvas gefraŭlaj paroj, la florkronulinoj kaj la florkronuloj. La unua en la vico estas la frat/in/o au la plej bona amik/in/o de la fianĉo au fianĉino; ofte ili estas la baptogeamikoj au la nomgeamikoj de la juna paro. La vicordon de la aliaj gastaj paroj decidas la parenca grado au la aĝo. La procesion fermas la gepatroj; ili estas la ĝojgepatroj respektive la ĝojbogegepatroj.

En nova tempo ceremonioestroj kaj -majstroj restis viroj. Sed nuntempe oni invitas malofte florkronajn parojn; do la popolkutimoj malriĉiĝis.

La matrikulisto kaj la pastro ne apartenas al la familio, sed se temas pri esperantlingva ceremonio, geedzigas la gejunulojn porokaza oficisto, kiu parolas esperante; li au ŝi estas ankaŭ la matrikulanto.

La atestantoedzinoj restas en la domo por prepari la festmanĝaĵojn.

2. Baptoparencaj rilatoj.

Baptorilato povas esti amika au lausanga. En certaj regionoj la baptaneco herediĝis de generacio al generacio, do oni ne devas serĉi baptogeamikojn.

En aliaj regionoj la baptopatrino fariĝas la junaĝa amikino de la patrino; se ŝi jam estas okupita, la edzino de la junaĝa amiko de la patro. prenas tiun rolon.

Eble oni invitas baptogegepatrojn gravajn personojn esperante, ke la nova baptparenceco subtenos la karieron de la baptinfanoj. Sed tiuj rilatoj estas nur formalaj (ekz. en Hungario inter la du mondmilitoj la regnestro fariĝis la baptopatro, se en la familio naskiĝis deka infano.). Oni neglektis la baptajn kutimojn dum la milito au se la bebo naskiĝis ekster la geedzeco.

Katolikaj infanoj, kiam ili fariĝas 13-jaraj kaj estos specife konfirmataj, elektas ankaŭ "konfirmajn" gepatrojn.

En ne-religiemaj familioj oni proponas enkonduki la civilan nomdonanfeston; en tiuj kazoj ĝenerale dominas la patrinaj rilatoj.

Se la baptoparenceco herediĝas, sed ankau en aliaj kazoj, oni ofte nomas la gefratojn de siaj baptogepatroj baptopatro, respektive baptopatrino. Malofte oni diras baptovo, baptovino.

Pli gravas tiuj rilatoj, se iuj ne havas lausangajn gefratojn au se la geavoj ne plu vivas, sed la baptogeavoj ankoraŭ vivas..

Tiuj, kiuj tenas la bebon dum la baptado, estas la baptogepatroj. La baptito estas ties baptofilo au baptofilino. La nomojn de la baptogepatroj oni povas karesformi same kiel la nomojn de la gepatroj (baptopano, baptopaĉjo au baptopanĵeto, baptopaĉĵeto).

La baptogepatroj ĝenerale uzas la tutan nomon, sed la baptitoj ne ŝatas la longajn alparolojn, do ili nomas la baptogepatrojn simple "baptano", ĉar la vorto ne havas precizan sencon. Mi proponas personigi la vorton kaj formi el ĝi viran au virinan karesnomojn, eble baptujo au baptuĉjo.

Anstataŭ la disvastiĝinta formo baptano estus pli bona formo baptamiko, baptamikino, ili estas pli longaj, sed pli precizaj.

La konfirmaj gepatroj kaj gefiloj alparolas unu la alian kiel baptogepatroj kaj baptogefiloj.

Se la infano ricevas nomon en civila ceremonio, la baptanoj nomas unu la alian tradicie ankau per propra nomo. Se iam disvastiĝus la vortoj nomgepatroj, nomgefiloj, ni povus ilin karesformi tiel kiel la nomojn de la gepatroj kaj gefiloj. miaopinie ni ne devas serĉi novajn formojn kiel ĉe la baptogepatroj, ĉar la vortoj nompatro kaj nompatrino estas nur unu silabon pli longa ol la nomoj de la lausangaj gepatroj, kaj ili estas facile prononceblaj.

La gepatroj alparolas unu la alian baptosinjoro au baptosinjorino, ofte nur simple per vokonomo.

3. Ceteraj rilatoj.

Ankau mi havas multe da apuduloj. kelkajn mi povas alparoli simple kiel kolego kaj kamarado. Se mi ne trovas konvenan vortradikon, ĝenerale helpas la prepozicio "kun-" kiel prefikso au "-an-" kiel sufikso, ekz.

kunstudento, kunsoldato, kunprofesoro, do kunulo en iu stato. La sufikso -an- esprimas apartenecon al iu grupo, ekz. samideano, samdomano, samvilaĝano; eblas ankau kundomano, kunvilaĝano.

Se la rilato estas intima, mi povas diri amiko-kolego, amiko-soldato, amikolernanto. La vorto amiko apartenas ceter al la 10 vortoj, kiujn la esperantistoj uzas plej ofte.

4. Finaj rimarkoj.

Verŝajne vi demandas, kial oni devas tiom precizigi ĉi tiujn rilatojn. Mi jam emfazis, ke - lau mia opinio - en la estonteco la homoj denove vivos en grandaj familioj, do mi devas koni la proksimecon de la parenca grado. En la praktiko oni devas scii la gradon ekz. kiam oni heredas au geedziĝas.

Mi provis diferencigi la lausangajn kaj boajn parencecojn de la ceteraj rilatoj. En la ĉiutaga vivo oni tiom ofte renkontas kaj alparolas la gebaptoparencecojn (au ni esperantistoj la patronantajn geonklojn) kiom la lausangajn. Por eviti miskomprenon mi emis klarigi kie finiĝas la lausanga au boa parencecoj kaj kie komenciĝas la amikaj rilatoj. Povas okazi, ke la traktataj gradoj parte koincidas, ekz. ke la onklo ankau estas baptopatro, ĉi-kaze oni devas decidi pri la primareco de la duobla ligo.

Novaj kolegaj kaj movadaj amikecoj hodiaŭ ofte anstataŭas la malnovajn infanaĝajn rilatojn, kiuj longe estis rigoraj kaj oficialaj, nun ili iom post iom "demokratiĝas".

Adreso de la aŭtoro: D-ro Balazs SZEMÖK
Pozsonyi ut 2
H 2737 Ceglédbercel.

(Vidu ankau la artikolon "Esprimoj de la malproksima parenco per la prefiksoj pra- kaj bo-" de la sama aŭtoro en Sci. Rev 45 (1994)(2)-165, p. 31-34. - Rim. de la redakcio).